Internaciaj Ekzamenoj
**Skriba parto**

Specimeno
**Elementa nivelo**

Poentoj: 100 Sukceslimo: 60% Tempodaŭro: 3 horoj

## 1. Lega kompreno

**Legu la sekvan tekston kaj respondu la demandojn post ĝi.**

Hodja bezonis grandan kaserolon. Li vizitis najbaron kaj prunteprenis grandan, belan, fortikan, kupran kaserolon por sia kuira tasko. Sed la granda kupra kaserolo tiel multe plaĉis al li, ke li deziris ne redoni ĝin.
Baldaŭ venis tiu tago, je kiu li, laŭ antaŭa promeso, devis redoni la kaserolon; sed li vizitis la najbaron portante bonan sed tre malgrandan kaserolon, kies formo tute similis al tiu de la prunteprenita kaserolego.
"Kaj kio estas tio?" demandis la najbaro.
"Via kaserolino, kiun vi afable pruntis al mi, ĵus naskis ĉi tiun kaserolidon. Hodiaŭ ŝi estas ankoraŭ multe tro malforta post la akuŝo por eliri mian domon. Mi do petas vin, hodiaŭ akcepti la idon, kaj la kaserolpatrino revenos tuj kiam ŝi povos sendanĝere eliri".
La najbaro iom miris, sed li volonte akceptis novan kaseroleton kaj kiam la edzino laŭte protestis, ke Hodja montris sin nefidinda kaj ekspluatas lian paciencon, li iom akratone ordonis al ŝi fermi la buŝon.
Post kelkaj tagoj Hodja, kiu dume faris per la kaserolego diversajn utilajn kuirlaborojn, reportis ĝin, puran kaj sendifektan.
"Jen, mi rekondukis vian estimatan kaserolinon; ŝi nun fartas tute bone". La najbaro kaj lia edzino ĝojis pro la bela profito.
Post kelkaj semajnoj Hodja denove bezonis grandan kaserolon; do, li vizitis la saman najbaron, kiu varme bonvenigis lin, facile konsentis pruntedoni la kaserolegon kaj ĝentile helpis Hodjan porti ĝin hejmen.
Pasisseptagoj.Pasisduasemajno.Pasistriasemajno.Nenio pri la kaserolido!
Post monato la najbaro vizitis la domon de Hodja kaj kun multaj komplimentoj kaj ĝentilaj pardonpetoj demandis, kiam la kupra kaserolego revenos. La edzino vere bezonis ĝin por kuiri pilafon por pluraj gastoj.
"Ho ve, estiminda najbaro! Kara frato!, ĉu neniu informis vin pri la malgajega evento?"
"Pri kio? Mi aŭdis nenion pri via familio, kara Hodja".
"Ho ve! Via bela kaserolego mortis antaŭ du semajnoj!"
"Kion vi diras? Kaserolo mortis? Fi, mensogisto! Trompisto! Friponaĉo! Malislama hundo!" Kaj la najbaro tiel kriis, insultis, piedfrapis kaj pugne minacis ekster la domo, ke scivolema homamaso rapide kolektiĝis kaj policano demandis, kio okazis.
Hodja klarigis: "Vere, via bela kupra kaserolo mortis dum ŝi estis ĉe mi. Estis la volo de Alaho kaj ni devas tion akcepti, same kiel vi akceptis la kaserolidon, kiun via kaserolino naskis. Estas laŭ la leĝoj de la vivo, ĉu ne?, ke io ajn, kio povas naski, ankaŭ devas morti. Do, penu kiel eble plej takte klarigi al la orfa kaserolido, ke la patrino forpasis".
La amaso tuj konsentis, ke la klarigo estas bona kaj la najbaro devis foriri ja kun mieno tute taŭga por funebra tago.

(El Faktoj kaj fantazioj de Marjorie BOULTON)

**TASKOJ**

**A. Trovu en la teksto sinonimojn de**

a. silenti …………………………….
b. akcepti …………………………….
c. nasko …………………………….
ĉ. grupo …………………………….
d. sen gepatroj …………………………..
e. forpasi …………………………….
f. voli …………………………….
g.kompleze …………………………….
ĝ. filo …………………………….
h. malfeliĉega …………………………….

(10 poentoj)

**B. Respondu per plenaj frazoj:**

a. Karakterizu Hodjan kaj la najbaron.
b. Kial Hodja ne volis redoni la kaserolon al la najbaro?
c. Kiel reagis la najbaro kaj lia edzino, kiam Hodja portis la kaserolidon?
ĉ. Kial mortis la kaserolino?
d. Kiel reagis la najbaro eksciinte la novaĵon?

(15 poentoj)

## 2. Diktaĵo

*Unu el la ekzamenantoj legas proksimume 100-vortan tekston, kiun la kandidatoj devas ĝuste skribi. Ni ĉi tie ne donas ekzemplon. La teksto inkluzivas ĉiujn Esperantajn literojn.*

(10 poentoj)

## 3. Eseo

*Elektu unu el la sekvaj kvar temoj kaj verku 400-vortan eseon pri ĝi. La Ekzamena Komisiono aljuĝas po dek poentojn por lingva ĝusteco, idea enhavo kaj stilo.*

a. Ĉu fantomoj ekzistas hodiaŭ?
b. Mia unua Esperanto-kongreso.
ĉ. Ĉu la modernaj komunikiloj kunigas aŭ malkunigas la geamikojn?
d. Ksenofobio: ĉu tute nova homa esprimo?

(30 poentoj)

## 4. Aŭskulta kompreno

*La kandidato devas aŭskulti du sonbendigitajn aŭ laŭtlegatajn tekstojn. La tekston unu el la ekzamenantoj legas dufoje, ambaŭfoje ili estas malrapide legataj (proksimume 80 vortojn minute). La kandidato ne rajtas vidi la tekstojn, kvankam ĉi tie estas prezentata specimeno en skriba formo.*

*Pri la unua teksto la kandidato devas respondi kvin demandojn, kiujn eblas legi antaŭ la aŭskultado.*

En decembro 1888 transiris al Esperanto la grava volapuka klubo en Niirnberg, Germanujo, kaj fariĝis la unua Esperanto-klubo en la mondo. En septembro 1889 ĝi fondis la unuan Esperanto-gazeton, "La Esperantisto". Tion la esperantistoj jam tre bezonis por kontaktigi ilin unu kun la aliaj kaj por liveri modelajn tekstojn en la nova lingvo kaj unuecigi la stilon de la plejparte izolitaj adeptoj.
Fine de 1890 Zamenhof transprenis la eldonadon, sed en decembro 1891 li trovis sin tiel senmona, ke li devis anonci ĉesigon de la revuo. Tia bato eventuale mortkondamnus la lingvon. Feliĉe intervenis la germano W. TROMPETER, kiu garantiis la necesan monon kaj efektive savis la burĝonantan lingvon. Tamen en 1895 la cara cenzuro malpermesis la gazeton en Ruslando, tiel ke "La Esperantisto" perdis tri kvaronojn de sia abonantaro.

**Respondu al la sekvaj demandoj :**

a. Kie kaj kiel estiĝis la unua Esperanto-klubo?
b. Kio estis la utilo de la unua gazeto "La Esperantisto"?
c. Kial la gazeto riskis morti fine de 1891?
ĉ. Kial tamen ĝi povis pluvivi?
d. Kiu grava bato okazis al Esperanto en 1895?

(15 poentoj)

*La dua tasko estas aŭskulti aldonan tekston pri la sama temo kaj resumi ĝin en ĉirkaŭ 100 vortoj. La kandidato rajtas aŭskulti la tekston dufoje kaj rajtas fari notojn dum la aŭskultado. Estas triminuta paŭzo inter la du aŭdigoj, dum kiuj la kandidato rajtas eklabori.*

La praktika utilo de Esperanto jam komenciĝis en la formo de vojaĝoj, dum kiuj la lingvo ludis seriozan rolon. Ekzemple en 1895 du svedoj vojaĝis tra Rusujo, Turkujo, Rumanujo, Aŭstrujo, Hungarujo kaj Germanujo kontaktiĝante kun lokaj esperantistoj. Tiaj vojaĝoj donis faktan pruvon pri la taŭgeco de la parola lingvo.
Malfacile imageblaj por hodiaŭaj esperantistoj estas la etoso kaj efiko en tiuj pioniraj tagoj. Jarojn poste franco Carlo BOURLET priskribis sian propran sperton:
"Tuj aperas antaŭ miaj okuloj la fantoma bildo de maldika, pala viro kun longaj blondaj haroj, maldensa flava barbeto kaj fikse rigardantaj bluaj okuloj: SELEZNEV!
Tiu asketo kun sia longa griza palto, kies kolumo estis ĉiam levita, estis la unua eksterlanda Esperantisto kun kiu mi parolis en Esperanto. Mi bone memoras la festenon en la 'Cafe Voltaire', kiun ni organizis en oktobro 1902 je lia honoro, lian flaman parolon, la fluantecon de lia esprimado, kiu tute mirigis nin. SELEZNEV estis nia parolinstruisto, ĉar li la unua pruvis al ni, parizanoj, ke Esperanto povas esti parolata kun la samaj facileco, eleganteco, rapideco kiel iu ajn nacia lingvo".

(El La fenomeno Esperanto de Wiliam AULD)

**Resumu la aŭditan tekston en 100 vortoj.**

(10 poentoj)

## 5. Kulturaj konoj

*Parigu la maldekstrajn indikojn kun la dekstraj. Skribu taŭgan literon en la koncernan spacon kaj atentu, ke ne ĉiuj literaj respondoj estas bezonataj.*

Verko de William AULD ___
Verko de KALOCSAY ___
Verko de BAGHY ___
Traduko de ZAMENHOF ___
Traduko de Kazimierz BEIN ___
Traduko de De DIEGO ___
Poemo de ZAMENHOF ___
Frua romano en Esperanto ___
Lastatempa romano en Esperanto ___
Vidbenda kursmaterialo ___

A: «Hamleto»
B: «La vojo»
C: «Streĉita kordo»
Ĉ: «La inĝenia hidalgo Don Kiĥoto»
D: «Sinjoro Tadeo»
E: «Dum vi estas kun ni»
F: «Hura!»
G: «La infana raso»
Ĝ: «Pro Iŝtar»
H: «La faraono»
Ĥ: «Pasporto al la tuta mondo»
I: «Pasporta Servo »

(10 poentoj)

**La solvojn de la testo** nia redakcio povas sendi al vi en aparta retmesaĝo, se tion vi petas de la redaktejo je la adreso : katalin@ikso.net

Bv. klare indiki la solvojn de kiu testo vi bezonas.